Christian Friedrich Hebbel,

Aŭtuna bildo

tradukita de Manfred Retzlaff

Neniam vidis tian tagon mi!
Senspira kvazaŭ estas la aer',
Susure tamen falas ĉie ĉi
Plej belaj fruktoj suben al la ter'.

Ne ĝenu tiun feston de l' natur'!
Rikolto ĝia estas tio nun,
Ja malligiĝas de la branĉoj nur
La fruktoj faligitaj de la sun'.

Traduko de la Germana poemo "Herbstbild" de Christian Friedrich Hebbel *(∗1813-03-18 – †1863-12-13) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2008-11-03.*

MR-469-3 / Arg-610-1573 (2013-01-21 13:44:33)